



Revuo
por la geaktivuloj
de FEL

Numero 28
Januaro 2002

Q
—
Q
—
Q



Paco,
sano
kaj prospero
estu viaj en
la nova jaro
2002



Wist u dat een abonnement op **Monato**
slechts EUR 39 kost?

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

<http://monato.esperanto.be>

Flandra Esperanto-Ligo

Estraro

Prezidanto *Eddy Raats*
Vicprezidantoj: *Flory Witdoeckt*
Johan Van Eenoo
Sekretario *Lode Van de Velde*
Kasisto *Roland Rotsaert*
Anoj *Walter van den Kieboom*
Ivo Durwael

Oficejo

La oficejo de FEL troviĝas en Frankrijklei
140 en 2000 Antwerpen. Ĝi estas malfermita
por la publiko ĉiun labortagon inter la 9a kaj
la 12a30 kaj inter la 13a30 kaj la 17a30.
Vizitontoj bonvolu tamen anticipi inter-
konsenti pri rendevuo.

Telefono (ofichoroj): 03 / 234 34 00

Telekopio (tagnokte): 03 / 233 54 33

E-poŝto:

fel@esperanto.be

Interreto: www.esperanto.be

La ĝenerala respondeco de la revuo restas
ĉe la redaktoro, la aŭtoroj mem respon-
decas pri siaj propraj artikoloj aŭ raportoj,
kaj la enhavo de ili ne devas kongrui kun la
opinio de la redaktoro.

Vertikale: periodaĵo por la geaktivuloj de FEL.

Numero 28, aperis en januaro 2002

Abonoj ĉe FEL

Korespondadreso: Vertikale
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen

Flandra Esperanto-Ligo

PROKOKOLO ESTRARKUNSIDO

sabato la 24-an de marto 2001
1840 Londerzeel

Ĉeestis: Eddy Raats (ER), Flory Witdoeckt (FW), Ivo Durwael (ID), Walter Van den Kieboom (WVDK), Lode Van de Velde (LVDV) kiu protokolas.
Senkulpigis: Roland Rotsaert (RR), Johan Van Eenoo (JVE)

1. PROTOKOLO DE LA LASTA KUNSIDO

La protokolo estas akceptita.

2. DIVIDO DE TASKOJ

Prezidanto: Eddy Raats

Vic-prezidanto: Flory Witdoeckt

Vic-prezidanto: Johan Van Eenoo

Sekretario: Lode Van de Velde

Kasisto: Roland Rotsaert

Membroj: Ivo Durwael, Walter Van den Kieboom

3. LABORPLANO DE UEA

Fakte FEL plenumas la agadon, sed mankas agado por ne-esperantistoj. Ekzemple kiel utiligo de Esperanto ni povas nomi INTERKULTURO. Pli pri nia agadplano vidu punkton 5.

4. INTERKULTURO

FW prezentis la projekton en Valonio (Binche). Unu lernejo akceptis oficiale enkonduki INTERKULTURO-n. Unue la partoprenantaj instruistoj ricevos esperanto-lecionojn; ili siavice instruos al la infanoj.

FW alvokas ĉiujn kontakti ŝin kun ideoj. Binche estas 2-hora veturo, konstante veturi tien estas tre temporaba. Alia solvo estas uzi ekz. interretan kurson aŭ Mazi.

La instrumaterialo estu sufiĉe altnivela kaj prefere rektmetoda.

5. INFORMADO: LABORPLANO DE FEL POR 2001

LVDV prezentis jenan laborplanon:

La ideo estas agi aparte en ĉiu provinco: unue tie trovi iun kiu pretas instrui/prelegi (paŝo 1) kaj nur tiam komenci la informadon (paŝoj 2-4).

La fakta kunlaboro okazu ekde septembro 2001 (nova lerneja jaro) aŭ januaro 2002 (nova kalendara jaro).

Provincnivele:

1. trovi preleganton/instruiston (ne tre indas informado sen preta kursofero)
2. aperigi reklam-anoncojn en ĵurnaloj, revuoj, ... prefere senpage (perpere) aŭ interŝanĝe. LVDV konceptis reklamanoncon taŭgan.
3. alskribi diversajn asociojn por proponi esperanto-kursojn, prelegojn, ktp.
4. telefoni la asociojn pri la propono (plej bonas persona kontakto).
5. kunlaboro kun la asocioj.
6. malferma tago (aŭ semajnfino) fine de decembro pro la 20jara jubileo de FEL-Frankrijklei. Ankaŭ koincidas kun Zamenhofa Tago (kvankam tio estu nur sekundara afero).

Superprovince:

1. Trejni instruistojn en seminario.
2. Fari/trovi altkvalitan, modernan instru-materialon.

La estraro aprobas la planon kaj konsilas starigi laborgrupon por la praktika ellaboro. Interesitoj nepre kontaktu LVDV.

6. NOVA DEKRETO

ID skizas la kadrodekretan kaj la pozicion de FEL.

FEL povus konformi je du kategorioj:

a. "verenigingen"

Problemo ĉi tie estas ke laŭ la plano, oni postulos 50 Lokajn Grupojn post la transirperiodo, kio por ni praktike ne estas atingebla. Por la transirperiodo oni provizore metis nombron de 25 LG. (Tio estus kun kkj trukoj jes ja atingebla, sed tiam leviĝos problemo post la transirperiodo.)

b. "bewegingen" Pri tio ĉi, la dekreto estas tre malklara, sed kelkaj punktoj ja revenas: "laboratoria funkcio" kaj "dynamismo".

Praktike: La por "bewegingen" gravaj kernvortoj "paco, toleremo, Eŭropo" fakte ne estas en niaj statutoj. Eblas adapti la statutojn (en ĝenerala kunveno aŭ per skriba voĉdono), sed ni ne povos prui tian ĉi pasintan agadon.

Finance: por "bewegingen" estas antaŭviditaj 150 miljonoj; subvencioj estos

inter 3 kaj 6 miloj; dum la nombro de "diensten in overgang" estas 80. Simpla kalkulo rezultigas en la rekonon de 30-40 asocioj kaj la forfalon de la ceteraj.

ID proponas reagi jene: "Pluraj asocioj kiuj faras bonan laboron ne bezonas 3 milojn, sed povas vivi kun ekz. nur 1 miliono. Tial estus bone malaltigi la minimuman subvencion al ekz. 1 miliono. Tiel ĉi, pli da asocioj povos plu vivi."

ID sendos tian ĉi leteron al VCVO kaj al asocioj en simila situacio.

ID ankaŭ konsultos la kabineton por ekscii ĉu plej bonaj aliĝi kiel "beweging" aŭ kiel "vereniging".

7. PROJEKTO 2001

Laŭ Arlette Thys, povas esti rekonita kiel projekto ankaŭ simple nia agado. La projekto 2001 estis preparata nesciante tiun ĉi eblecon. Do ni ĉesos la projekton kaj Guido povus anstataŭe roli en la nova "Laborplano de FEL por 2001". (Vidu punkton 3).

8. DIVERSAĴOJ

a. Nerealigitaj decidoj

La sekretario remetu sur la tagordon de ĉiu sekvanta kunsido la nerealigitajn decidojn de antaŭa(j) kunsido(j) ĝis ilia efektivigo aŭ nuligo.

b. Reklamoficejo

LVDV vizitis malgrandan reklamoficejon por varbi reklamanojn por *Horizontaal/Monato*. Konsiloj de la oficejo mem estis jenaj:

- jamaj anoncoj plifaciligas trovadon de pliaj anoncoj;
- indas viziti kkjn aliajn malgrandajn reklamoficejojn.

Paul Peeraerts pretas aperigi kkjn senpagajn reklamojn por ruli la aferon. LVDV proponas interŝanĝanojn anstataŭ tute senpagajn anoncojn.

c. ideoj

- G. Pirlot kaj D. Van Herpe pro ilia reprezenta funkcio havu <...@esperanto.be>-adreson.

- estraranoj havu nomkarton (profesieco); LVDV konceptu nomkartojn.
- netaŭga uzo de la paneloj de la FEL-stando

FW proponas uzi elastajn/kaŭĉukajn bendojn por ligi la aĵojn; plie: sur la paneloj certe aperu la adreson

"<<http://www.esperanto.be/>>www.esperanto.be".

- tre indas organizi Lingvan Festivalon en lernejo. Fakte jam de kelkaj jaroj kuŝas tiu ĉi ideo en tirkesto, atendante organizantojn disponantaj pri sufiĉe da tempo...

ĉ. manlibro por aktivuloj estu je ĉies dispono. ID aranĝos por ER; FW petos ekzempleron de M. Van den Bempt.

d. Eŭropees eresenaat

Wim nome de FEL proponos Selten kaj Maertens kiel kandidatojn por la venonta jaro.

e. Eŭropa Kongreso

Prelegintoj kiuj ne estas en la listo de partoprenantoj ne ricevis sian ekzempleron de la postkongresa libro. ID komparos la listojn kaj rektigos la aferon.

f. Instruista edukiĝo

ILEI-Belgio ne sciis respondon al la propono de LVDV. Sed nun kun la Laborplano por 2001, ĝi fariĝas necesa. Do ni alskribu Atilio por kunlaboro, krome ankaŭ ID pretas kunlabori.

ER povas disponigi filmfragmenton pri CSEH-kurso kiu estos uzebla dum la trejnado.

g. Jubileo Esperanto-domo

Fine de tiu ĉi jaro, la Esperanto-domo en Antverpeno (Frankrijklei) fariĝos 20-jara. Ĝi estos festata kun prelegoj kaj aktivecoj. Eventuale kun honorigo de flandra meritplena aktivulo.

Ni petu la liston de partoprenintoj de la malferma tago de UEA.

ĝ. Dumtagaj kunvenoj en LVS

ID proponas enkonduki la koncepton "leescafé" en LVS. Ni komencu organizi tion dum vendredaj posttagmezoj, antaŭ la ĉiusemajna vespermanĝo. Tio logos homojn kiuj vespere ne povas; plus povas instigi homojn ankaŭ veni por la vespero kaj kunmanĝi.

Due, FEL havas komputilon neligeblan al la loka reto, sekve senutilan, do ĝi povus iri al LVS por ebligi al vizitantoj uzi ĝin. En ĝi estu informoj pri Esperanto, kursoj, k.a. Ni lanĉu la ideon je la jubilea festo de LVS kaj aperigu la eblecon en HT.

h. Dom-stilo

La nuna domstilo estas enkondukita en 1981 konsile de reklamoficejo. LVDV pensis pri ŝanĝo de la stilo kune kun sia nova reklamanonco-koncepto, sed restas stoke tro da leterpapero kaj kovertoj por radikala ŝanĝo. FW proponas oran mezvojon: adapti la litertipon en la reklamanonco de LVDV por ke ĝi estu konforma al la alia domstilo, sen perdo de ĝia forteco.

ĥ. Antaŭa protokolo

Estas akceptita, sed ID tamen notis kelkajn adaptendajn punktojn kaj komunikos ilin al JVE.

**PROKOLO
ESTRARKUNSIDO**
sabato la 12-an de majo 2001
Oudenaarde

Ĉeestas: Eddy Raats (ER), Flory Witdoeckt (FW), Johan Van Eenoo (JVE), Roland Rotsaert (RR), Ivo Durwael (ID), Walter Van den Kieboom (WVDK), Lode Van de Velde (LVL) kiu protokolas.

1. ANTAŬA PROKOLO

Akceptita.

2. INTERKULTURO

En Binche oni uzas 'Mazi' por instrui la lernantojn. FW jam havas peton de alia lernejo, sed elĉerpiĝis 'Mazi' ĉe FEL. Je la 28a de junio venos la lernejoj de Binche al Ostendo, kie ili i.a. akceptiĝos urbodome kaj kune ludos kun lokaj infanoj.

Rimarko: la retpaĝo pri interkulturo ne estas sufiĉe rapide aktualigata.

3. BURELO BRUSELO

ER laŭtlegas 2 leterojn. Principe UEA kaj EU akceptas.

Estas jenaj postuloj: estu 1 plentempa aŭ 2 parttempaj dungitoj. Kostoj estos 37.000 • jare (8.500 • sen subteno de UEA).

Al FEL nun ne estas postuloj, temas pri puraj preparlaboroj kaj sonĉoj diversloke.

R. Corsetti avertis ke ni eble atendu malpli ambician realigon.

FW kunsidos je la 30a de junio en la financa komitato. WVDK konkludis el konversacio kun O. Buller, oni nepre havu profesian kernon de homoj surloke kaj ke bona kunlaboro kun C.O. estas grava.

Konkludo: Ni devas provizore atendi pliajn evoluojn. ER proponis ke ni ĉiuj pripensu la aferon kiel 'hejmtasko'.

4. HORIZONTAAL

4.a. Aspekto

ER jam parolis kun Iwona pri eventuala engaĝiĝo de Dirk por *Horizontaal*

(speciale pri engaĝigo); li atendas pozitivan respondon.

4.b. Enhavo

La enhavo estu pli proksima al la homoj kaj al la L.G. Pli da vojaĝrakontoj kaj spertoj k.a. konservante la nunajn artikolojn, sed certe estu loko por tio. Ni ne estas sufiĉe kompetentaj por serioze pritrakti lingvajn problemojn. ER aliros Dirk. La redakcia komitato projektos enhavpolitikon por HT.

4.c. Bibliotekoj

HT nepre estu en bibliotekoj konsultebla (restas LA loko por fari esplorojn). Ni poste revenos al tiu ĉi temo, kiam HT estas renovigita.

5. EKOLOGIA POLITIKO DE LA CENTRO.

Estas iam decidita labori pli ekologie; sed Guido – la presisto – diras ke tiu recikla papero kaŭzas pli da problemoj, do ĉu ni reiru al 'offset'papero? ID proponas kompari ambaŭ paperspecojn en la praktiko. RR rimarkigas ke nune oni uzadas senkloran paperon anstataŭ reciklan paperon.

6. VVB

Propkrastita.

7. PLENUMO DE DECIDOJ DE ANTAŬA KUNSIDO

7.a. Laborplano 2001

LVDV raportas. Estas trovitaj kandidatoj por prezenti/instrui Esperanton, kaj en Antverpeno (Guido VD kaj Ivo D) kaj en Flandra Brabanto (Marc VDB, Frederik VDB). Aliaj homoj estas kontaktataj.

Guido proponis organizi seminarion pri informado, Marc VDB sciigis ke li havas pretan prelegmaterialon. Sekve tiuj ĉi du aferoj bone kombineblas en seminario!

Ivo sekvas kursojn ĉe 'Kwasimodo', laste pri la temo 'kvalito' kaj proponis dum la sama seminario – matene – pludoni siajn lernitaĵojn, por posttagmeze dum la seminario apliki ilin en la informada sesio. Estas planotaj ankaŭ seminarioj pri 'beleidsplan' kaj 'instruado'.

7.b. Nova dekreto

FOV organizas kunventagojn; 18/05 temas speciale pri "bewegingen", la dua kunveno 01/06 estos pli ĝenerale. ID iros al la unua kunveno; la dua malpli koncernas FEL.

7.c. Malferma tago

Estu anoncata en HT. Endas purigi kaj ordigi la domon kaj plibonigi la stacion de la muro ĉe la afrankejo.

La festeno en LVS estos je la 14a de novembro.

8. TINENA KURSO

En Tinenon oni volas oficialan kurson, sed la inspektoro Hazendonk malkonsilas: "kadre de la Eŭropaj lingvoj, pro tio ke ĝi estas planlingvo kaj pro tio ke ĝi ne havus soci-ekonomian valoron. Kempeneers kontraŭargumentas ĉar estas konforme al la reguloj de 'volwassenenonderwijs'.

9. DIVERSAĴOJ

9.a. Pridiskutotaj dokumentoj

Ili estu prefere antaŭe jam disponeblaj, ekz. per sendado al la [estraro]-listo.

9.b. Jubileo de LG

FEL donacas kuponon de 1.000 BEF, validante por FEL-eldonaĵoj.

Donace al vi (Phil Bosmans)

La aŭtoro mem skribas pri siaj tekstoj: ili estas skribitaj por helpi, subteni kaj konsoli homojn pere de vortoj. Tra la jaroj miaj tekstoj naskiĝis el profunda doloro pro tiom da suferado, mizero kaj malespero. Ili kreskis el ĉiutaga, ofte kortuŝa konfrontado kun la fundamenta senpoveco de homoj iom feliĉi en tiu ĉi mondo.

Paĝoj: 76; 21 cm; ilustrita; vinktita; 2000.

Prezo: **EUR 7,00**

**PROKOKOLO
ESTRARKUNSIDO**
sabato la 9-an de junio 2001
2000 Antverpeno

Ĉeestis: Eddy Raats (ER), Flory Witdoeckt (FW), Johan Van Eenoo (JVE), Ivo Durwael (ID), Roland Rotsaert (RR), Walter Van den Kieboom (WVDK), Lode Van de Velde (LVDV)kiu protokolas.

1. ANTAŬA PROKOKOLO

Akceptita.

2. NEFINPLENIMITAJ AFEROJ

a) Uzado de papero: Guido devas ankoraŭ fari la eksperimenton.

b) Donackuponj por jubileo de LG: ĝi validu ne nur por FEL-eldonoj.

3. RENOVIGO DE HORIZONTALAAL

ER rendezuis kun Dirk, kiu akceptas fari la grafikan parton de *Horizontala* (kvankam farado de revuoj ne vere estas lia metio). Dirk kunsidos kun Guido pri *Horizontala* kaj poste pretas prizorgi la estontan aspekton.

Dirk proponos:

a) uzi alian paperon

b) aldoni rubrikon "leteroj"

c) alproksimiĝi al la grupoj

(Kaj venis propono de JVE enkonduki rubrikon 'anoncoj'.)

ID jam parolis kun Guido, kiu konsentas kun la konceptitaj gvidlinioj (vidu fine de la protokolo).

ER proponas 2 alternativajn manierojn por dissendi la revuon (resp. tra poŝtabono kaj tra gazetara distribuisto); li esploros la prezojn kaj praktikajojn.

Se tio estas plmi favorpreza, tio povas kompensi eventualajn pli altajn kostojn de pli altkvalita papero.

4. FARADO DE KOMUNA STARPUNKTO KAZE DE MALFACILAJ SITUACIOJ

Estas grave ĉiam informi la aliajn estraranojn kaze pri problemoj. Farota.

5. LETERO DE LEO DE COOMAN RILATE LEĜPROPONOJN

Flandroj rajtas formuli leĝproponojn al la Flandra Parlamento. Ĉu utilis por Esperanto?

ID sendis la komunikon al Dan Van Herpe. Tamen, en la retpaĝoj de la Ĉambro troveblas nenia regularo rilate tion. Do ni ankoraŭ ne scias kiel formuli tiajn proponojn.

6. INTERKULTURO

FW raportas:

- Lernejoj sufiĉe rapide konvinkeblas, sed problemo estas trovi taŭgan instruiston.
- En Binche, instruistoj kaj lernantoj kune lernas per MAZI. Ostendo invitis la klason por la 28a de junio (per dulingva letero Ned+Esp).
- Poste, FW estis kontaktata de lernejo en La Louvière por partopreni en la projekto.
- La libron kiu akompanas la MAZI-vidbendon, FW sendis al Binche kaj evidentiĝas sufiĉe taŭga por ekzercigi la lernantojn.
- FW daŭre bezonas taŭgan instruiston; venis propono kontakti Flochon.

Nuna strategio: atendi la viziton en Ostendo, poste paroli kun la instruistoj kiuj spertis la projekton por elfari konkludojn. FW raportos dum sekvonta estrarkunsido.

7. FINANCOJ

Demando: Estas malfacile superrigardi la financan analizon de FEL (AVA-futura). Kial ne havi apartan librotendon por la du ĉefaj partoj de FEL? Nome de la Grafika Centro kaj de la Movado, por havi pli klaran bildon pri la situacio kaj ekscii kio subtenas kion? Sekve de kritiko, ER volas povi pruvi al la membroj ke la situacio interne de FEL estas justa.

M. Van den Bempt supraĵe analizis la financojn kadre de AVA-futura; G. Maertens pretas fari pli profundan analizon de la librotendo. RR sciigas ke jam delonge li serĉis pli taŭgan analizomanieron, sed ke ne troveblis; same mankas taŭga librotena softvaro kiu povas analizi ambaŭ flankojn de FEL. Kialo: la Grafika Centro kaj la Movado estas kaj kliento kaj liveranto. Krome, FEL ricevas subvenciojn pro la membroj (=movado), sed ankaŭ pro la dungitoj (= Grafika Centro); do apartigi la du estas ege malfacile. El la praktiko ankaŭ evidentiĝas ke unu ne povas ekzisti sen la alia.

La Centro subtenas la Movadon kaj inverse; kvazaŭ simbiozo.

Konklude: ER sendos al tiuj kiuj riproĉas la librotendon superrigardon de

ĝi; raporton de la rivozoro kaj ankaŭ kopion de letero de M. Van den Bempt en kiu li klare skizis la interdependecon de la Centro kaj la Movado.

La estraro zorgas pri tia kritiko kaj esperas per malfermeco solvi la aferon.

8. SIMPOZIO GENTO

Anonco akcidente ne aperis en *Horizontaal*. Kompense aperos senpaga reklamo en Monato.

9. VVB

VVB ŝajnas havi ligojn al Vlaams Blok.

La kunlaboro de FEL kun VVB estas komencita iom naive kaj kun jenaj 3 motivoj:

1. alpaŝo al ekstera publiko per kunlaboro kun aliaj organizoj;
 2. aperado de Esperanto ĉe ekstera publiko.
 3. la espero ricevi subvenciojn aŭ alian kompenson por la farata traduklaboro.
- FEL neniam supozis ligojn al Vlaams Blok, kiuj cetere restas ankaŭ nun ne tute klaraj.

Tamen, ni decidis ke ni nepre evitu indentigon kun ekstremdekstruloj kaj sekve ni ĉesigu la kunlaboron.

10. KULTURA KONSILIO DE LA PROVINCO ANTVERPEN

ER konstatis ke FEL ne ĉeestis kunsidon, nek senkulpigis pro neĉeesto. Tio ĉi ne estas la bona maniero por fari bonan impreson. Estonte, oni nepre senkulpigu, se ne troveblas delegito.

11. RESPONDECULO PRI LA KORESPONDADO EN FEL

Foje ID malfermas leterojn, foje Paul, foje Guido. Estas preferinde havi respondeculon pri la poŝto kiu surmetas la nomojn de koncernataj personoj, por eviti mismeton de leteroj.

12. STUDOTAGO

La studotago pri Kvalito kaj Informado okazos la 8an de julio ekde la 10a horo.

ID gvidos la sesion pri Kvalito, Marc prizorgas prezentadon de Informpreleg-materialo, kiu poste estu disponebla ĉe FEL por kandidatprelegantoj.

13. LABORPLANO 2001

a. Estas sendita letero al diversaj asocioj, sidantaj en la kultura konsilio de la Provinco Antverpeno. En ĝi, FEL proponas kontribui al ilia programo pere

de prelego, debato aŭ provleciono kaj/aŭ serio de lecionoj.
Ni atendas reagojn kaj eventuale mem alvokos la asociojn.
b. Vidu §12: Studtago.

14. DIVERSAĴO

Estu disponebla rete konsultebla kalendaro de Esperanto-aranĝoj en Belgio kaj okazu regula dissendo. Fine, pro praktikaj kialoj, ni opcias por la instigo de la LG dissendi cirkulerojn (al membroj, aktivuloj kaj aliaj LG) kiel faras Iwona Kocieba por la antverpena grupo.

La migranta judo (August Vermeylen)

En ĉi tiu malgranda sed poezica kaj esprimforta romano, la aŭtoro pakis la esencon de sia vivo kaj karaktero. La majstraĵo konsistas en tio, ke li abstraktas sian propran travivaĵon kaj rekonkretiĝas ĝin en konata historio, tiu de la Nazaretano.

Paĝoj: 72; 21 cm; vinktita; 2001.

ISBN 90 71205 90 8.

Prezo: **EUR 8,00**

Tarokoj kaj epokoj (Chris Declerck)

La libro havas "membiografian meĉon", ĉirkaŭitan de "materialo dokumenta", vakso kiu nutru la flamon kaj ĝi brulas lante kiel kandelo. Ĝi donas bildon pri nia mondo fine de la dua jarmilo. Laŭ Donald Broadribb, la tuta libro temas "pri la mensostato de la aŭtoro". Se tiel, ĝi estas serĉo de la vero – verko kun filozofia subfluo.

Paĝoj: 656; 21 cm; kudre bindita; 2002.

ISBN 90 71205 98 3.

LA LIBRO BALDAŬ APEROS !

PROKOKOLO
ESTRARKUNSIDO
sabato la 9-an de septembro 2001
Oostende

Ĉeestintoj: Eddy Raats (ER), Flory Witdoeckt (FW), Roland Rotsaert (RR), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Walter Van den Kieboom (WVDK), Lode Van de Velde (LVDV)
Senkulpigis: Johan Van Eenoo

1. ANTAŬA PROTOKOLO

Akceptita.

2. NEPLENUMITAJ AFEROJ

2.1. Uzado de papero: ankoraŭ ne ekzamenita.

2.2. Alternativaj sendmanieroj: ER esploras pri poŝtabono. Alia ebleco montriĝis netaŭga pro nia malgranda kvanto de abonoj.

2.3. Interkulturo: FW ankoraŭ ne povis kontakti Flochon aŭ lernejojn, ĉar ja estis la lerneja ferio; raportoj pri IK jes ja aperis en diversaj revuoj (i.a. la Konko).

2.4. Financoj: G. Maertens ankoraŭ ne reagis.

2.5. Malfermado de poŝto: ne farita. PP diras ke daŭre okazas mismetoj. Tamen, tio estu interne en la GCA solvota, ne ĉe FEL-estraro.

2.6. Laborplano: LVDV raportas: li devas plutelefoni al la organizoj; pro la somera ferio ne okazis agado.

3. LABORPLANO DE FEL ("WERKPLAN")

Ni aldonu la jenan celon: "konservi la lingvan diversecon". FW ilustris la temon per belega rakonto el la Itala Kongreso: Imagu ke post 50 jaroj, vi devos legi Dante en la angla. La italaj aŭskultantoj vere ŝokiĝis pri tio. (Por ni nederlandlingvanoj, t.s. legi Bomans, Gezelle, Timmermans, k.a. angle.) ID pludonos ŝanĝendaĵojn al la laborplano al Guido Van Damme, raportos al la estraro kiu reviziu ĝin antaŭ la ĝenerala kunveno, kie ĝi estu akceptata.

4. JUBILEA FESTO: 20 JAROJN ESPERANTO-DOMO FRANKRIJKLEI

La malferma tago okazu proksime al la Brusela tago, por ke homoj de malproksime povu partopreni ambaŭ kaj pli multnombre. Ni petu ĉu eble Agnes pretas organizi ion.

5. ASEKURO

Kio se volontulo havas akcidenton? Kio se okazas problemo dum FEL-organizaĵo? ER demandas sin. RR informis ke la nuna maklero translokiĝis al Loveno, sekve estas tre malfacile atingebla. ID informiĝos ĉe LVS, OMOB kaj Hodler pri respondecaj personoj, volontuloj, k.a. Ŝajnas ke OMOB estas bona alternativo.

6. DIVERSAĴOJ

6.1. RR demisias; posteno de kasisto vakantas

6.2. EPA-kunveno: FW, WVDK, ER reprezentos FEL.

Esperanto. La nova latino de la eklezio(Ulrich Matthias)

Jam de pli ol 100 jaroj Esperanto servas al la kompreniĝo inter kristanoj el al tuta mondo. Tiu ĉi libro rakontas pri la historio kaj nuntempo de la katolika kaj protestanta-movado. Kaj ĝi vortigas la argumentojn por lingvo, pri kies avantaĝoj kristanaj esperantistoj ĉiam denove konsciiĝas.

Paĝoj: 144; 21 cm; ilustrita; kudre bindita; 2001.

ISBN 90 71205 97 5.

Prezo: **EUR 7,95**

PROKOKOLO
ĜENERALA MEMBROKUNVENO
sabato la 29-an de septembro 2011
Esperanto-Centrum, 2000 Antwerpen

1. PROKOKOLO DE ANTAŬA ĜENERALA MEMBROKUNVENO

Aprobata.

2. PROJEKTO POR SUBVENCI-PETO

Guido Van Damme prezentis la Projektplanon kiu necesas por ricevi subvenciojn por la periodo 2001/2002. Ĉeestantoj povis trarigardi la kompletan tekston, kiu ankaŭ aperas en *Vertikale*.

La Ĝenerala Membrokunveno akceptis la Projektplanon.

3. BUĜETO 2002

Aprobata.

4. INFORMOJ PRI NOVAJ DEKRETOJ

Ivo Durwael klarigas. La novaj dekretoj troviĝas en la lasta stadio de preparo. La teksto nun estas ĉe la asocioj (FOV -) kiu ekzamenas la proponojn. Oni ankoraŭ devas voĉdoni pri la teksto, sed verŝajne ne okazos multaj ŝanĝoj antaŭ tio.

La subvencio estas inter minimume 3 kaj maksimume 8 miljonoj, el buĝeto de entute 150 miljonoj, do maksimume 60 kandidatoj povas ricevi subvenciojn, t.e. nur duonon de la asocioj.

La ĉefa elemento kiu ludas rolon dum la prijuĝo estas la socia graveco. Subvencioj iras al tiuj asocioj kiuj plej bone atingas grandan publikon pri tendenco en la socio, manko de io, problemoj, k.s. Ni havas aktualan temon, sed mankas eĥo de la socio.

Se la proponoj estas akceptitaj, la dekreto validos ekde la mezo de 2003. Post transira periodo venos novaj instrukcioj rilate subvencipetadon. La petojn prijuĝos la komisiono mem, profesoroj kaj reprezentantoj de Movadoj. (Movado = limigita grupo de homoj kiuj provas atingi la publikon pri iu afero.)

5. INFORMOJ PRI LA EŬROPA INFORM-CENTRO EN BRUSELO

La Komitato de UEA konsentis pri 30.000 • dum 2 jaroj por la Inform-Centro.

Gregoire Maertens informis ke la Centro devus ekfunkcii jam en tiu ĉi jaro.

6. DIVERSAĴOJ

6.1. *Horizontaal*

Guido Van Damme, trovinta alian laboron, forlasis FEL. Unu el liaj ĉefaj taskoj estis redakti *Horizontaal*. Ĉiuj Lokaj Grupoj estas petataj helpi trovi posteulon por la redaktado, kaj en la grupoj mem kaj ĉe konatoj. Interesitoj kontaktu FEL (Lode Van de Velde).

Pri la enhavo: venos nova rubriko 'Leteroj' kaj estos rezervita pli da spaco por la LG, kiuj estas petataj foje sendi artikolon kiu povas interesi la membrojn: pri aktivecoj, interesaj vojaĝo-spertoj k.a.

La tekstoj publikigotaj en *Horizontaal* estos plejparte nederlandlingaj, malpli en Esperanto kaj eventuale kun traduko.

6.2. Vakantaj postenoj en FEL-estraro

Ekde la venonta Ĝenerala Membrokunveno ne plu estos en la estraro Johan Van Eenoo, Roland Rotsaert kaj Ivo Durwael. Sekve jenaj respektivaj postenoj estas vakantaj: vic-prezidanto, kasisto kaj estrarano. Kandidatoj bonvole kontakti FEL.

6.3. Vredesbus

Iwona Kocieba parolas pri la Paca Semajno de la 1a ĝis la 7a de oktobro. Ĝi estas bona okazo montri nian ekziston. Iwona sendis superrigardon al la Grupoj pri datoj kaj lokoj de eventoj, bedaŭrinde kiel apendico, kiun adresitoj ĝenerale timas malfermi.

6.4. Tuluzo

Iwona informas pri la katastrofo kiu tie okazis kaj kiu trafis kelkajn esperantistojn. FEL kolektos monon en FEL-konton. Donacojn bonvolu sendi kun la mencio "helpo al Tuluzo".

6.5. Anonco

Wim De Smet informas pri interesa libro, kiu estas kolekto de tekstoj en diveraj lingvoj pri Esperanto, kompilitaj de Klaus Schubert. Interesitoj kontaktu Wim De Smet.

6.6. Ideo

Marc Cuffez nome de sia grupo klarigas jenan ideon de Raymond Wylleman: kiam venas al Belgio grava persono (kiel ŝtatestro), oni povas sendi salutmesaĝon al tiu tra la ambasadejo de la koncerna lando. Flory Witdoeck rakontas ke ŝi sendis leteron de Renato Corsetti kun traduko al la ambasadejo de Usono post la okazintaĵoj tie kaj eĉ ricevis respondon. Do, povas esti bona afero, sed atentu ke la FEL-oficistoj estas.

6.7. La Ĝenerala Kunveno de BEF

Ĝi okazos je sabato la 13a de oktobro en Bruselo.

6.8. 30-jariĝo de la asocio por enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur
La festo okazos je la 13a de oktobro en Heide (Kafejo Cambuus, aliflanke de la placo antaŭ la stacidomo). Gratulmesaĝoj estas bonvenaj ĉe Wim De Smet.

6.9. Alvoko por Afriko

Agnes Geelen iros al Afriko ekde la 20a de decembro (Ganao, Lomeo kie okazos la kongreso kaj al Benino). Vortaroj kaj aliaj lernomaterialoj estas tre bonvenaj. Kontaktu FEL aŭ Agnes.

6.10. Vizitantoj el Afriko

Flory Witdoeckt anoncas pri Ganao lernejo kiu enkondukis Esperanton kaj el kiu 11 personoj volas viziti Eŭropon.

6.11. Ekspozicio en Kortrijk

Estis sukcesa la malfermo de la ekspozicio de infandeseĝoj el Uzbekistano. (Inter 8 kaj 14-jaraj). Poste deseĝoj de belgaj infanoj estos senditaj al Samarkando por ekspozicio tie. La Ambasadoro de Uzbekistano tuttage ĉeestis la ekspozicion.

Tiu ĉi agado montras ke Esperanto utilas.

La afero Jesuo kaj la Judoj (Peter J. Thomson)

Kiu fakte estis Jesuo? Kio estas lia signifo? Jam dum lia vivo pri tio furiozis arda konflikto kun la Judoj. Sed kiel la afero Jesuo rilatas al la Judoj? La libro serĉas la respondojn: unu pozitivan kaj unu negativan.

Paĝoj: 160; 21 cm; kudre bindita; 2001.
ISBN 90 71205 94 05.

Prezo: **EUR 11,00**

PROKOKOLO ESTRARKUNSIDO

sabato la 10-an de novembro
2000 Antverpeno

Ĉeestis: Eddy Raats (ER), Flory Witdoeckt (FW), Johan Van Eenoo (JVE), Roland Rotsaert (RR), Ivo Durwael (ID), Walter Van den Kieboom (WVDK), Lode Van de Velde (LVDV)

1. AKCEPTO DE LA PROTOKOLO DE LA ĜENERALA MEMBRO-KUNVENO

Akceptita.

2. APROBO DE ANTAŬA PROTOKOLO

Aprobita

3. NEPLENUMITAJ PUNKTOJ

3.a. Interkulturo

Ĉefa problemo estas la hejmpaĝo de Interkulturo; la infanoj atendas ke iliaj fotoj aperos tie, sed bedaŭrinde tio ne okazas pro lama ĝisdatigo de la paĝaro. FW atendas informojn el Italio. Vendredo la 20an de novembro estos kunveno; FW raportos pri tio poste.

3.b. Financoj

Konteltiroj ne estas aŭtomate sendataj manke de taŭga softvaro; tial nun okazas nur laŭ peto. Laŭ RR ne eblas tiel ĉi neglekti la klientojn ĉar tio sendube rezultigas malpli da vendoj, certe dum la jarfina periodo. RR skribos al P. Peeraerts kaj G. Jacques por proponi sian helpon, ĉar verŝajne oni devas por ĉiu kliento aparte eltaji la konteltirojn, k.e. temporaba okupo. RR proponas redukti la rentumon de la Verdaj Kontoj konforme al la nunaj tendencoj. La estraro rajtigas RR fiksi la novan rentumon (inter 2.5% kaj 2.0%) kaj fari la necesajn paŝojn.

3.c. Jubilea festo

Jo Haazen ĝis nun ne estis atingebla. ID proponas ke I. Kocieba invitu esperantiston por prelegi kun interpreto al la nederlanda lingvo por la ne-esperantaj ĉeestantoj (ekde la 14a horo). Ĉiuj invitu siajn parencojn kaj amikojn por la posttagmezo, kun senpagaj kafo kaj kukoj.

La vespera programo estos por klubanoj; plus homoj kiuj siatempe helpis starigi la esperanto-domon. Ili ricevos apartan inviton por la jubilea festo, plus kupono per kiu ili senpage povos manĝi. Ni proponas bufedon kaj meti monkolektujon.

3.ĉ. Horizontaal

Ĝi estas aprobita; FW proponas aldoni la anonctarifojn.

3.d. Kandidat-estraranoj

Ĝis nun ne anoncis sin kandidato(j).

3.e. Asekuro

ER atendas la respondon de la ministerio rilate la subvenciojn

4. BELEIDSCOMISSIE

Ĝi estas starigita kaj konsistas el: ER, FW, ID, PP, LVDV kaj G. Coenen. ID ĉeestis trejnadon sed proponas ne tuj eklabori por atendi la respondon de la ministerio rilate la subvenciojn (vidu poste).

5. PROCESO KONTRAŬ LA ŜTATO

La ŝtato ludas 'elĉerpigo-politikon' (uitputtingsstrijd); la kompleta dosiero estas konsultebla en la esperanto-centro.

6. RESPONDO PRI SUBVENCIOJ POR 2001/2002

Kvankam la cirkulero de la ministerio klare diris ke 'la ministro respondu antaŭ la 1a de novembro', ne venis respondo, i.a. pro ŝanĝoj en la ministerio pri kulturo, kaj povas esti ke jam ne plu restas mono por pagi la subvenciojn....

7. FAMILIO PEHRAJ

La familio Pehraj el Albanio fuĝis el la lando kaj nun troviĝas en azilcentro en Sint-Truiden. Bedaŭrinde ilia ŝanco por esti akceptata estas malgranda. Sekve ID verkis atest-leteron favore al s-ro Pehraj, menciante i.a. siajn proprajn spertojn kaj tiujn de A. Geelen por pruvi liajn sincerecon kaj honestecon. La estraro aprobas kaj subskribas la leteron.

8. EKSTERAJ RILATOJ

Studentino volas sekvi kiel funkciis la Eksteraj Rilatoj ĉe FEL ĝisnun kaj ellaboros planon pri "kiel povus esti la Eksteraj Rilatoj". La planon ni povos poste uzi. La estraro aprobas kaj subtenas la projekton.

9. Raporto pri informado en Diest kaj Kortrijk

En Diest, FW renkontis lovenan 'solidareco-koruson' de junuloj dum staĝa semajnfino kun diversaj laborgrupoj. Ili ĉiuj elektis esperanton kaj entuziasmiĝis pri la lingvo. FW peris informojn al M. Van den Bempt por pluflegi la kontaktojn. Li pensis kantigi ilin dum OSIEK2002.

En Kortrijk, FW kaj L. De Cooman vizitis lernejon por prezenti Esperanton en la 6a klaso de la mezlernejo Lieve-Vrouwencollege. Ili uzis i.a. 'Himno al la Ĝojo' kaj instruis la 16 regulojn. Ankaŭ ili sukcesis starigi tre bela standmaterialon de la Eŭropa Parlamento.

10. ADAPTO DE STATUTOJ

La parlamento ellaboras novajn leĝojn por aspc-oj (vzw's); kiuj nun - plejverŝajne - troviĝas en la lasta stadio antaŭ la fina aprobo. Kelkaj el la ŝanĝoj estas: simpligo de la donaco-sistemo, devigo de konsultebla registro pri ĉiuj membroj, ktp.

Transirperiodo estos 1-5 jaroj. Pro la ne-definitiveco estas preferinde atendi antaŭ ol fari statutŝanĝojn. ID atentigas ke ankaŭ por la subvencioj povas necesigi statutŝanĝon, sed same pri tiu dekreto: ĝi ankoraŭ ne estas definitiva. Dua kialo atendi ankoraŭ.

11. DIVERSAĴOJ

11.a. Bruĝo 2002

Oni proponis, okaze de Bruĝo 2002, ke la urbo aĉetu spacon en *Monato* por ĉiumonate informi pri la eventoj Bruĝo 2002. Bona ideo; ni atendas respondon.

11.b. ID anoncas ke studento volas fari 3-minutan **filmeton pri Esperanto**, konsistante el serio da intervjuoj.

Johano (K.J.K. Vroegop)

Johano. El la vivo de roterdama knabo estas la travivaĵoj de knabo dum la dua mondmilito. Amuza romaneto en facila lingvo. Rekomendita por komencantoj.

Paĝoj: 96; 21 cm; vinktita; 2001.

ISBN 90 71205 93 2.

Prezo: **EUR 7,50**

DIVERSAĴOJ

WAARHEEN MET FEL?

De Esperantobeweging heeft een lange traditie. Zolang ik met Esperanto bezig ben (sinds 1960) zie ik in Vlaanderen gelijkaardige manieren van informatie en werving en gelijkaardige activiteiten. En als ik de geschiedenis lees merk ik dat die al veel langer toegepast worden. We blijven zo verder doen uit gewoonte. Sommige initiatieven geven veel voldoening. Dat houdt ons als vrijwilligers actief. Maar heel wat activiteiten zijn ontgoochelend. We kunnen ons de vraag stellen of Esperanto nog een plaats zal kunnen bewaren in de maatschappij van morgen. Zijn de communicatieproblemen dezelfde als in 1887? Is onze informatie en onze actie nog aangepast aan deze tijd? Zijn we niet te veel vastgeroest in een traditioneel patroon van gesloten clubactiviteiten voor een klein groepje? Gebruiken we de beschikbare middelen wel goed? Gebruiken we geschikte middelen om een nieuw publiek aan te trekken? Doen we niet een resem dingen, die veel tijd en energie vragen maar met de missie van FEL niets te maken hebben? Heeft het allemaal wel zin ... en welke ... en waarom?

Het is tijd voor een grote denkoefening. In januari 2002 beginnen we met het uitwerken van een beleidsplan. Dit is NIET nieuw. We hebben verschillende keren onze organisatie doorgelicht. De belangrijkste initiatieven zijn de colloquia van Kalmthout in 1977 en van Leuven in 1995/96. In Kalmthout maakten we vnl. een inventaris van wat we wilden en dachten te kunnen realiseren. In Leuven hadden we alle elementen om te slagen: een duidelijke beschrijving van wat we willen bereiken en hoe we dat willen, een analyse van onze sterke en zwakke punten, een analyse van bedreigingen en mogelijkheden, een beleidsplan en een actieplan. En toch waren de resultaten van deze colloquia niet wat we er van verwacht hadden. Ze brachten nauwelijks verandering in onze acties. We zullen ons in de eerste plaats kunnen bezinnen over de mogelijke redenen hiervoor. De teksten van Leuven zijn een ideale basis en betekenen tijd- en energiewinst. Maar toch moeten we elke tekstregel terug overlopen en zo nodig aanpassen. Beleidsplan en werkplan zullen verplicht zijn volgens de nieuwe decreten van de cultuurminister. Maar los daarvan geloof ik dat het zinnig en uiterst

nuttig kan zijn voor FEL.

Ik heb een cursus “beleidsplanning” gevolgd en zal de nodige initiatieven nemen. Ik vermoed dat we wel een jaar zullen nodig hebben eer ons beleidsplan kan vertaald worden in een werkplan dat we meteen kunnen en zullen uitvoeren. Het meeste werk zal gebeuren door een planningsteam. Dat is al samengesteld: Paul Peeraerts, Eddy Raats, Flory Witdoeckt, Lode Van de Velde, Ivo Durwael. Guido Coenen zegde principieel toe om eventueel toe te treden als neutraal observator, maar hij moet nog een beter inzicht krijgen in wat van hem precies verwacht wordt. De samenstelling kan uiteraard nog veranderen.

Een beleidsplan moet echter de neerslag zijn van de ganse beweging. Het plan moet als het ware groeien binnen de groep van actievelingen tijdens de uitwerking. In de komende maanden zullen we dus beroep doen op jullie, hetzij voor het verwerken en becommentariëren van het werk van het planningsteam, hetzij voor het verzamelen van nieuwe gegevens en ideeën, hetzij voor het verspreiden en toepassen van de besluiten. Dat zal gebeuren met alle mogelijke middelen: per e-mail en/of per brief, op de algemene vergaderingen, tijdens vergaderingen van de administrantj enz.

Hier volgt al een eerste uitnodiging tot deelneming, zeker in te vullen door de administrantj, maar open voor iedereen, die begaan is met het lot van onze vereniging.

Ivo Durwael

Dis! (Sten Johansson)

Dis! estas libro kun strukturo originala, psikologio majstra, observemo detalema kaj kreema, atestanta pri spiritĉeesto. Sprita. Stile brila. Elstara libro.

Paĝoj: 136; 21cm ; kudre bindita; 2001.

ISBN 90 71205 95 9

Prezo: **EUR 12,00**

Ondergetekende,

.....

beheerder van de Vlaamse Esperantobond

O onderschrijft de keuze van een planningscommissie

O is niet akkoord met de samenstelling van de planningscommissie en suggereert

Voeg hieronder naar believen vragen, voorstellen, opmerkingen, kritiek

(Te zenden aan Esperanto-centrum, t.a.v. Ivo Durwael, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. E.adres: ivo@fel.esperanto.be)

Esperanto aŭ Esperinto

La uzo de la angla kiel internacia komunikilo progresas kiel fulmo. Proporcie falas la informiteco, la interesiĝo kaj fido en Esperanto. Kiam mi parolas pri Esperanto al maljunuloj, ili surprizite reagas : “Ĉu tio ankoraŭ ekzistas?” , junuloj eĉ neniam aŭdis pri ĝi.

En tia kriza situacio indas reiri al la origino: ilo por komuniki, por krei ponton inter popoloj kaj gentoj sed ankaŭ inter individuoj surbaze de egaleco por kontribui al pli harmonia mondo. Tiu mesaĝo restas nuntempe same aktuala kiel en 1887.

Ofte mi aŭdis la aserton ke la Esperanto-movado konsistas el du grupoj: tiuj, kiuj nur interesiĝas pri la fenomeno planlingvo kaj la “mondplibonigantoj”. Mi konas plurajn personojn, kiuj solene deklaras ke ili interesiĝas nur pri la lingvo kaj ne emas movadumi, sed samtempe diversmaniere kontribuas al la movado; mi tamen emas nomi ilin “nekonsciaj mondplibonigantoj”.

Flanke de la “aktivuloj” ekzistas gregoj da klubanoj, kiuj apenaŭ partoprenas en la internacia movado, sed nur volas aparteni al agrabla societo. Ankaŭ tiujn mi konsideras kiel “modestaj mondplibonigantoj”, kiuj ne emas perturbi sian rutinan vivon, siajn rituaron, ... sed tamen revas pri pli harmonia mondo.

Kiel konscia aktiva mondpliboniganto, mi apartenas kaj apartenos al malgranda grupo da homoj. Mi ankaŭ konscias ke mia kontribuo estos modesta, ke mi ne esperu je “fina venko”.

Kiel do kontribui al pli da harmonio inter popoloj kaj individuoj?

Samtempe kaj samproporcie kun la kresko de la globalizado kaj de la uzo de la angla kiel internacia komunikilo soras la streĉiteco en la mondo, ĝis nuntempe tre danĝera nivelo por la monda paco. Tie troviĝas ebla misio por nia movado. Per pli bona komunikado surbaze de egaleco (anstataŭ imperiismo) nia movado povus esti oazo de malstreĉiteco. Oazo de malstreĉiteco konsistas el grupo da malstreĉitaj homoj.

Multaj aktivuloj ekmiksas la rimedon kaj la celon. Kiam ni laboras por la venko de Esperanto, ni fariĝas streĉitaj. Ni eklaboras por pravigi nin mem, same kiel ĉiu ajn potencinstanco. Tiel estiĝis fanatismo kaj agresiva sinteno al la neesperantista mondo ĉe aro da Esperantistoj. Tiel estiĝas mitoj, kiujn Sikosek nun provas senmitigi, malgraŭ amaraj riproĉoj al li. Tiel estiĝas viglaj diskutoj kaj kvereloj ene de la movado, kiuj uzurpas la kompletan energion de multaj homoj kaj ne kontribuas al pli bona mondo. Pli harmoniaj kontaktoj estiĝas nur kiam mi estas malstreĉita, sen timo por konfrontiĝi kun nekonata starpunkto, sen internaj rezistoj al fremdaj ideoj. La devizo por sincera mondppliboniganto povus esti: "Antaŭ ĉiu iniciato, antaŭ ĉiu paŝo, kiun mi entreprenas por realigi ĝin, mi volas esti certa ke mi iel kontribuas al pli bona mondo". Kaj tio implicas ke ni konscie evitu terminojn kiel batali, venki k.s.

Kiam mi estas konvinkita ke mi konas lingvan rimedon por plibonigi la homajn rilatojn, mi ankaŭ havas la devon por komuniki tion al kiom eble plej multaj homoj, se ne mi ne meritas la epiteton de mondppliboniganto. Enfermi sin en malgranda rondo familia kaj dediĉi sian energion ĉefe al tio ne kongruas kun la ideo de pli harmonia komunikado en la socio. Kaj tamen la granda plimulto de nia energio, tempo kaj monrimedoj estas destinita por la jam informita Esperantistaro.

Mi mencias nur kelkajn ideojn kiel niaj agadoj povus kontribui al la bono de la tuta socio.

- Regule Esperanto-parolantoj organizas rondvojaĝon per la helpo de Esperantistoj. Multaj varme akceptas ilin kaj kondukas ilin al la Esperanto-klubo. Nu, se ni ĝuas tiajn kontaktojn kaj sentas ke tio riĉigas nin, kial ni ne invitas familianojn kaj amikojn en nia domo, en la klubo por konatigi kun tiuj personoj pere de nia tradukado. Kial ni ne kondukas tiujn homojn en aliajn societojn, en lernejojn, partoprenigas ilin al nia socia vivo ekster Esperantio por profitigi kaj riĉigi kaj nian gaston kaj niajn konatojn neesperantistajn .

- Kial ni ne pli ofte proponas al homoj en nia ĉirkaŭaĵo kiuj baraktas kun problemoj eksterlande helpon pere de niaj konataj Esperantistoj aŭ pere de delegitoj? ?

- Ni organizas centojn da kongresoj, renkontiĝoj k.s. en unu jaro, plej ofte kun partopreno de eksterlandanoj. Sed tiuj renkontiĝoj neniel

kontribuas al la socia vivo, ĉar ni tro multe enfermas nin. Raraj estas la okazintaĵoj, kiam ni antaŭvidas erojn, malfermaj al la publiko. Se ni unuflanke fanfaronas pri la harmonia etoso en niaj rondoj, ni povus ellabori programon kun partopreno de neesperantistoj. Foje ekzistas provo por iel kontakti publikon. Anstataŭ esceptokaze tio devus okazi regule. Ĉu ekzemple parto de la kulturaj programoj de niaj Universalaj Kongresoj ne povus esti alirebla al publiko ?

- Preskaŭ ĉiu landa asocio havas membrogazeton kaj dediĉas grandan parton de siaj eblecoj al ĝi. Kial niaj gazetoj ne estas ĉefe en la nacia(j) lingvo(j) kaj disvastigas novaĵojn pri niaj ideoj kaj spertoj ? Kial niaj gazetoj ne distrumpetas la eblecojn por ekz. akiri informojn eksterlande pere de la delegita reto. Ĉu UEA povus organizi informservon por neesperantistoj (kontraŭ pago) pere de la delegitoj ? La servojn de la delegitoj ĝi povus kompensi per siaj membroservoj (membrecio, kongreskotizo, revuabono).

- Kial niaj revuoj ne estas malfermaj al ĉiuj asocioj, kies agado iel tuŝas niajn celojn: internaciajn rilatojn, lingvoproblemojn, turismon, internacian edukadon, plurlingvecon, internaciajn familiojn...

- UEA kune kun aliaj kupolaj asocioj streĉas sin por liveri belan revuon al siaj membroj. Samtempe mi regule malkovras malpurajn fotokopiojn, mane kaj mallerte korektitajn kiel informmaterialo. Ĉu ne estus pli bone malpli atenti la aspekton de membrerevuo kaj anstataŭe disponigi plaĉan kaj trafan informmaterialon en kiom eble plej multe da lingvoj al landaj asocioj.

- Ĉu UEA povus, kune kun landaj asocioj, kiuj havas oficejon, fondi internacian tradukoficejon, tiel ke interrete atingeblaj kunlaborantoj traduku en la propran nacian lingvon?

- Ktp. ktp

Ivo Durwael

La kosmo kaj ni (David Galadí-Enríquez & Amri Wandel)

Plena monografio pri moderna astronomio. Ĝi estas vera manlibro pri teoria kaj praktika astronomio en lingvaĵo kaj stile komprenebla ankaŭ de ne-fakuloj.

Paĝoj: 200; 21 cm; ilustrita; kudre bindita; 2001.

ISBN 90 71205 92 4

Prezo: **EUR 18,00**